

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Ing. R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 26

ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

OKTOBRO 1934

Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj.

(Fino.)

De E. Drezén.

Angla kaj latina lingvoj kiel internaciaj terminologiaj normoj.

Povas tamen ekesti demando, kial teknikuloj ĉiulandaj preferu por internacia terminologia normigo artefaritan lingvon Esperanto anstataŭ plej uzata en nuna tempo angla lingvo aŭ la iama scienca mondlingvo latina.

Koncerne uzadon de angla lingvo por tiu celo, evidente ĝi ne povas realigi, nek ĉe kapitalismo (pro antagonismoj de la kapitalisma sistemo) nek ĉe socialismo.

Lenin skribis: „neniajn privilegiojn al iu nacio aŭ al iu lingvo“ (vol. XVII, pĝ. 135). Akcepti iun lingvon kiel internacian scienc-teknikan normon signifas doni tre gravajn privilegiojn al „elektita“ popolo. Do, nur lingvo „neŭtrala“ ne nacia povas esti tia normo. Cetere, pro la sama principo de „neŭtraleco“ rumana delegito Nikolau dum Madrida kunsido de la komitato por ordigo de scienc-teknikaj terminologioj proponis revivigi por la rolo de internacia lingvo de scienco la mortintan latinan lingvon. Tamen tiun proponon subtenis nur delegito de Italio kaj neniu plu. Certe unu el la kaŭzoj de simila fiasko estis, ke latina lingvo tute ne estas iu neŭtrala lingvo. Enkonduko de latina lingvo sendube donus konsiderindajn privilegiojn al romanaj popoloj (interalie al italoj kaj rumanoj).

Sed tiun fiaskon antaŭdifinis ankaŭ alia kaŭzo. Latina lingvo estas morta kaj rigida. Artefarita lingvo kiel Esperanto sendube estas multe pli adaptiĝema al nuntempo kaj krome ĝi estas pliriĝebla kaj evoluigebla, kio rilate al latina lingvo estas multe pli malfacila. Ankaŭ ne eblas nun serioze aserti, ke latina lingvo ĝis nun estas iu internacia normo (iu ordigita internacia ĉifrado).

Ĝi en medicina nomenklaturu en USSR, Germanio, Aŭstrio, Svisio, Hungario, Polio estas aplikata unu latina lingvo, kaj en Usono, Anglio, Skandinavio, Holando kaj en Suda Afriko alia latina lingvo. Tialferosulfato en la unua

grupo de landoj havas la nomon „Ferum sulfuricum oxydulatum“ kaj en aliaj landoj „Sulfas ferrosus crystalisatus“.

D-ro Wüster en sia libro „Internacia Lingvonormigo en la tekniko“ (Berlin 1931) por „senakva etilena alkoholo“ donas ĉe 7 diferencajn terminojn, kaj ĉiu el tiuj 7 terminoj en iu lando estas konsiderata kiel „latina“.

Latina lingvo povas esti bonuzata kiel granda rezervujo de terminoj kaj vortoj (ekzemple kiel vorto „omnibus“, nun akceptita en multaj lingvoj kun tute alia ol en latina lingvo senco). Tamen kiel sistemo de la lingvo la latina lingvo ne taŭgas por esti akceptita kiel internacia terminara normo.

Nia rilato al provoj starigi internaciajn terminologiajn normojn.

Kia povas do esti kaj kia estas nia rilato al la montriĝantaj eksterlande tendencoj daŭrigi laborojn pri interna „laŭsenca“ koordinado de diverslingvaj terminoj, starigante por tiuj terminoj iun nesekueblan internacian artefaritan normon (iujn normigilojn—etalonojn“ de scienc-teknikaj konceptoj) en formo de vortaro de „artefarita“ internacia lingvo?

Ni nepre subtenos ĉiun laboron pri internaciigo de scienc-teknikaj terminoj, kondiĉe, ke interesoj de „naciaj“ lingvoj, de „nacia“ kulturo kaj de vastaj popolamasoj ne estos malatentataj.

Plene respondas al niaj interesoj kaj celoj, se la frazo kiel „klasifiko de aparatoj de transformatora tipo“ estos en ĉiuj lingvoj formata el terminoj laŭforme similaj al tiuj „naciilingvaj“ terminoj, metitaj en la sama ordo kaj tute koincidantaj laŭ sia senca signifo. Same respondas al niaj interesoj, se rezultoj de internacia unuigo de scienc-teknikaj terminoj (laŭ senco kaj laŭ formo) estos fiksataj per iu internacie reguligita normo, per iu terminologia ĉifrado, kun aldonita preciza difino en ĉiuj lingvoj.

Tiam estos eble doni plenan klarecon al la problemo, kion signifas en „internacia“ kompreno kaj en „speciale rusa“ kompreno du „internaciaj“ terminoj, en rusa lingvo ofte uzataj unu anstataŭ alia: „kaŭĉuko“ kaj „rezino“. Ni esperas, ke tiam estos ankaŭ klarigite, kio devas esti konsiderata kiel pli internacia: ĉu angla prononco, ĉu angla transskribo.

Povas esti, ke post starigo de tia internacia „ĉifrado“ francoj kaj belgoj fine klarigos por si mem, kio kaj en kia senco devas esti uzata ĉu „standardisation“ ĉu „normalisation“. Eble tiam estos pli da ordo en nuntempa lingvo-kaoso, kiam franca termino „gabarit“, uzata ankoraŭ nun en portugala lingvo (en formo „gabri“), akceptos en rusa lingvo pli larĝan teknikan senco, sed samtempe la granda teknika vortaro de Pitman ankoraŭ en 1928 tute ignoras tiun terminon. Povas esti, ke tiam francoj larĝigos la sencon de ĉi-vorto kaj ke germanoj kaj angloj alhasos ĝin por uzado paralele kun propraj naciaj terminoj (Lehre — Grenzlehre, gauge — limit gauge). Tre verŝajne, ke tio helpos tute forigi la superflujajn sinonimojn: eteno—etileno, etino—acetileno, kiuj ni menciis en supre citita tabelo de saturataj hidrogenaj karbidoj.

De tiu vidpunkto, kaj bone konsciante, ke ĝenerala akcepto de iu internacia lingvo dum kapitalismo ne estas ebla (?? Red.), ni tamen subtenos ĉiujn iniciatojn celantajn uzi „artefaritan internacian lingvon“ kiel „internacian scienc-teknikan terminologian ĉifradon“. Ĉi-okaze tio jam estos grava paŝo antaŭen kompare al kompilado de multlingvaj, ne ĉiam precizaj, ne ĉiam sufiĉe plenaj teknikaj vortaroj.

Kaj la praktika uzado de tiu ĉifrado, ebleco de ĝia plua evoluigo jam difinas, en kia grado kaj kiamaniere ekzistado de tiu ĉifrado influos al evoluigo, pliriĝigo kaj precizigo de naciaj scienc-teknikaj terminologioj.

Por kio povas esti utila Sovetunia normigkomitato (SNK) al internacia laboro pri normigo de terminoj, simboloj kaj konceptoj.

Apanta pozicio de SNK kompare al organoj de normigo en aliaj landoj, ĝia samtempa funkcio de supera scienca kaj oficiala leĝodona institucio donas al soveta normiglaboro solidan bazon kaj klarigas intereson de koncernaj eksterlandaj institucioj al agado de SNK.

Politiko de USSR en la teknika sfero, konsiderante konstantan plikreskon de la rolo de USSR en mondmastrumo, komencas influ ankaŭ la teknikon en aliaj landoj. Se metra sistemo en la tuta mondotekniko jam okupas unuan lokon anstataŭtante ĉiujn sistemojn (laŭ raporto de Prof. Zalucki ĉe ĝenerala konferenco de Mazuroj kaj Pezoj en oktobro 1933 en Parizo), ankaŭ tio elkestis grandparte dank' al konforma politiko de USSR en afero de ĝia tekniko.

Fakto, ke en multaj branĉoj USSR rekonstruas teknikon (kaj ankaŭ normigon) post la kapitalistaj landoj, permesas al USSR elekti el eksterlanda sperto la plej bonon kaj ĝin ekproprigi. USSR havas eblecon elekti kaj el la plej bonaj metodoj kaj atingajoj eksterlandaj kompli propran, kiel ekzemple tio okazis ĉe elekto de propra soveta sistemo de gradoj de precizeco el elementoj de sistemoj akceptitaj en Germanio, Italio kaj Francio.

Povas do ankaŭ okazi, kiel ni tion

vidas el ekzemplo de franc-portugala vorto gabarit, ke preferata en soveta scienco kaj tekniko termino estos akceptata ankaŭ de aliaj landoj kiel internacia. Entute elmontriĝis konsiderindaj ebloj influ per soveta normiglaboro la normiglaboron eksterlandan kaj unuavice influ ĝin en la fakoj ne „komercaj“, sed bazaj, scienc-teknikaj, do ankaŭ en kampo de unuoj, ideoj, simboloj kaj terminoj.

Konsiderante ĉi tion, SNK:

1. Alcelos internacian laboron de Internacia Elektroteknika Komisiono, Internacia Asocio por normigo kaj de aliaj organizaĵoj en interna senca koordinado de diverslingvaj teknikaj terminoj kaj signoj (simboloj) per preparado kaj korektado de rusaj partoj de koncernaj terminologiaj tabeloj per tradukoj en du aŭ tri ĉefaj eŭropaj lingvoj.

2. Uzos en internaciaj rilatoj ĉiujn internaciajn normojn (interalie la decimalan klasifikon de Internacia Biblioteka Instituto, simbolojn de Internacia Elektroteknika Komisiono k. a.), ne provante ĝin ŝanĝi sen apanta neceso, sed estante ĉiam preta partopreni iun iniciatan internacian laboron pri studo, perfektigo kaj plibonigo de la ekzistantaj normoj.

3. Penos enigi bazajn normotabelojn de klasifikoj kaj scienc-teknikajn normojn se ne tute, do ĉiam almenaŭ parte en koncernan internacian praktikon.

de la baltaj kaj slavaj lingvoj. Ni devas ankaŭ memori, ke Zamenhof scipovis almenaŭ unu ne hind-eŭropan lingvon, nome la hebrean (certe ne parenca al la finna, cetere!), kaj tio emis doni al li pli vastan vidkampon kaj eble malhelpis, ke li sekvu tro sklave la tradiciojn kaj konvenciojn de la okcidenteŭropaj lingvoj. Kia ajn estas la kazo, ni certe trovas antaŭ la fino de mia parolado sufiĉe grandan nombron da trajtoj, kiuj komunas inter Esperanto kaj la skandinavaj kaj finna lingvoj.

La nordeŭropaj lingvoj, kiujn mi volas konsideri, apartenas al du ĝisfunde malsamaj lingvofamilioj. La skandinavaj lingvoj formas apartan grupon de la germana (teŭtona, gotona) branĉo, kiu siavice estas hind-eŭropa lingvo parenca al la sanskrita, greka, latina, slavaj lingvoj ktp. Aliflanke la finna kaj estona lingvoj apartenas al la finno-ugra lingvofamilio, kiu ankaŭ entenas la madjaran. Laŭstrukturo preskaŭ ĉiu hind-eŭropa lingvo ekzistanta hodiaŭ montras evoluadon el pli fleksia tipo (la hind-eŭropa substantivo fleksiiĝis ekzemple en ok kazoj: nominativo, vokativo, akuzativo, genitivo, dativo, lokativo, ablativo, instrumentalo) al pli vortizola tipo. El ĉiuj hind-eŭropaj lingvoj la angla kaj la kapholanda aŭ Afrikaans plej multe senfleksiiĝis; en la teŭtona lingvaro la nordaj lingvoj ankaŭ iris longan vojon en tiu direkto, ĉar ili jam perdis la akuzativon kaj dativon de la substantivoj, uzante aŭ la vortordon aŭ prepoziciojn kiaj til por indiki la rektan aŭ ne-rektan celon de la agado (jeg gir mannen boken) kaj — en la parola lingvo almenaŭ — ili emas forigi la distingon inter la tri personoj en la verbinaĵoj, ekz. jeg har, du har, han har, vi har, de har. Tamen ili ankoraŭ konservas almenaŭ du generojn en la substantivo kaj fleksias la adjektivon en la forta kaj malforta formoj. Kontraŭe la finna konservas tre nuancorican kazosistemon kun ablativo, ellativo, inessivo ktp. por funkcioj esprimataj en niaj lingvoj per prepozicioj; ĝi fleksias la adjektivon laŭkaze kaj laŭnombre kaj distingas personojn per verbinaĵoj (menen, mene, menemme, mnette ktp.); tamen, ĝi ne havas generojn, kaj eĉ la pronomo de la tria persono ĥan estas neŭtrala laŭsekse kaj signifas aŭ „li“ aŭ „ŝi“.

En la komenco sufiĉas, ke ni ekatentu pri pluraj pli malpli hazardaj kaj negravaj akordiĝoj inter Esperanto kaj la skandinavaj lingvoj. La „malforta“ aŭ difinita formo de la adjektivo havas en la sveda la finaĵon -a, ekz. den varma sommaren „la varma somero“, kaj kelkaj adjektivoj jam en la baza formo havas -a, ekz. stilla „trankvila“, samtida „samtempa“. Ankaŭ en la radikaro, precipe ĉe radikoj, kiujn Zamenhof adaptis el la germana aŭ angla lingvoj, okaze troviĝas formoj, kiuj estas por diversaj kaŭzoj pli proksimaj al la nordlingvoj ol al la germana, ekz. benko (kiun Zamenhof sendube volis distingi de banko); lino, vino (norv. lin, vin kontraste kun germ. Leinen, Wein kun sudgermanaj diftongoj). Kelkfoje la simileco stariĝas pro tio, ke Zamenhof elektis anglan aŭ platgermanan formon preferi ol altgermanan, ekz. bedo (norv. bed), sama (norv. samme), silko (norv. silke), skrapo (norv. skrape). En pluraj ekzemploj la nordlingvoj posedas kontraŭe al germana fremdvorton, kiu ankaŭ troviĝas en Esperanto, ekz. norv. ofre (Esp. oferi), konkylie (Esp. konkko), liljekonvall (Esp. konvalo),

W. E. Collinson:

La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj.

Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo.

Mi komencas la paroladon pri „La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj“ per pardonpeto kaj klarigo.

Mi neniel povas pretendi esti specialisto aŭ kompetenta fakulo en la nordeŭropaj lingvoj; mi studis la skandinavajn lingvojn el historia kaj gramatika vidpunkto kaj la finnan por akiri lingvan vidpunkton pli larĝan kaj por povi legi ĝian allogan literaturon. Mankas al mi ĉiu ajn ekzerco en la praktika uzado de ili, do mia prononco de citaĵoj devas esti abomeninda. Tamen, mi havas tiel sinceran admiron kaj amon al la nordaj literaturoj kaj sentas min tiel hejme inter la nordaj homoj, ke mi kuraĝas doni mian obolon, kaj mi esperas, ke vi — la nordanoj precipe — pardonos al mi mian aŭdacon. Eble vi ne tro malŝatos la observojn de iu, kiu el lingva vidpunkto eble estas „eksterulo“, sed en kies vejnoj fluas la norda sango.

Mi volas antaŭforigi alian tute naturan zorgon viaflankan. Vi povus esti tentataj pensi, ke Esperanto havas neniom ajn da trajtoj, kiuj alproksimigas ĝin al la nord-eŭropaj lingvoj. Oni bone scias, ke laŭradike almenaŭ Esperanto estas baze kaj

fundamente klasika, latindevena lingvo, riĝigita tie ĉi tie el la angla, germana, franca kaj slavaj lingvoj. Ni konstatas, ke Zamenhof estis fervora studento de multaj lingvoj, kaj povus suspekti, ke ĉiu el ili pli malpli lasis postsignojn aŭ iomete koloretigis lian elpensadon. Pro la cirkonstancoj, en kiuj li vivis, li devis akiri almenaŭ praktikan scipovon pri la pola, rusa kaj litova lingvoj; pro sia juda deveno li frue ekkonis la hebrean kaj la jiddan; en la lernejo li zorge trastudadis la klasikajn lingvojn, la anglan kaj la francan kaj interesiĝis poste je la itala. Multrilate la germana estis lia profesia kaj scienca lingvo. Mi devas konfesi, ke mi tute ne scias, ĉu li iam enprofundiĝis en la studon aŭ de iu ajn skandinava lingvo aŭ de la finna; eĉ s-ro Nylén ne povis sciigi min pri tio. Mia opinio la germana kaj slava konoj de Zamenhof tre forte influis la gramatikan kaj stilistikan strukturon de lia lingvo, kaj pro tio, ke la skandinavaj lingvoj estas parencaj al la germana, ili verŝajne ankaŭ prezentos kelkajn similaĵojn aŭ kompareblajn punktojn. Pri la finna estas alia afero, sed kvankam ĝi ne estas parenca al la hind-eŭropaj lingvoj, tamen ĝi mem subiĝis al la influo de la sveda kaj

Páske (Esp. Pasko), **point** (Esp. poento). Malofte ni trovas vortojn tute malparencajn rilate al la fontvortoj en la latina, sed laŭsone sufiĉe proksimajn. ekz. norv. **leje**, Esp. lui (franc. louer, el lat. locare), norv. **vej**, Esp. vojo (fr. voie, el lat. via).

La vortfarado en Esperanto estas karakterizata per altgrada sistemeco kaj regul-eco; ĝi kontrastas al tiu de la plej multaj naciaj lingvoj en tio, ke ĝi aplikigas ne laŭ iu ajn arbitra konvencio aŭ tradicio, sed senlime. Ankaŭ en la teŭtonaj lingvoj troviĝas sufiĉe fortaj normigaj tendencoj kiaj la disvastigo de la origine platgermana sufikso **-het** (norv.) por formi novajn abstraktajn vortojn. Ankorau pli impona estas la simileco de la finna al Esperanto rilate al la libera uzado de afiksoj. Kompreneble la afiksoj fakte uzataj en Esperanto plejofte estas latindevenaj, ekz. **-ec** (de ital. **-ezza**, el **-itia**), **-an**, **-ad**, **-ar** (en herbarium ktp.), sed rimarku slav. **slovar** 'vortaro'. Tamen en la latina kaj romanaj lingvoj ĉi tiaj sufiksoj tre firme kunligiĝas kun la radiko por formi vortunuon, dum ke en Esperanto la derivaĵoj estas facile analizeblaj kaj la afiksoj estas izoleblaj.

Multnombraj adjektivoj en la finna povas fariĝi abstraktaj substantivoj per aldono de la sufikso **-us/-ys**, kiu egalvaloras al **-ec** en

Esperanto, ekz. **vapaa** 'libera', **vapaus** 'libereco'; **suuri** 'granda', **suuruus** 'grandeco'; **korkea** 'alta', **korkeus** 'alteco'. Esperanto havas tre ofte uzatan sufikson **-ej** por la loko, kie io okazas aŭ troviĝas; la finna ankaŭ posedas specifan lokan sufikson **-la** kaj efektive uzas ĝin eĉ en kazoj, kie oni emus heziti uzi la Esperantan sufikson **-ej**, ekz. **pappi** 'pastro', **pappila** 'pastrodomo, pastrejo'; **huvi** 'plezuro', **huvila** 'vilao, plezurdomo, plezurejo'; **Kalevala** 'la ejo aŭ loĝejo de Kalev'. En la finna ekzistas ankaŭ taŭga sufikso por kolekto da objektoj, nome **-sto**, kiu egalvaloras al la Esperanta **-ar**. Efektive la finna havas specialan vorton **metsä** por 'arbaro', sed oni povas kompari sana/sanasto kun vorto/vortaro, laiva/laivasto kun ŝipo/ŝiparo, kirja/kirjasto kun libro/libraro kaj hermo/hermosto kun nervo/nervaro (nervsisistemo). La instrumenta sufikso en la finna **-in** multrilate similas al la Esperanta **-il**, sed la finna havas specialajn vortojn por 'tranĉilo', 'kudrilo' kaj 'flugilo'. Kelkfoje la finna eĉ transpaŝas la limojn de la Esperanta sufikso, ĉar oni diras por 'sentorgano' **aistin**, t. e. sentilo, por 'pleto' **tarjotin**, t. e. servilo, por 'razilrimeno' **hiasin**, t. e. frotilo, kaj por 'amboso' **alasin**, t. e. subilo.

(Daŭrigota.)

Br. Migliorini:

La personaj nomoj.

Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esp.-Kongreso en Stokholmo.

Pli malpli diversaj ĉe la primitivaj kaj ĉe la civilizitaj, ĉe la antikvaj kaj ĉe la modernaj popoloj de la mondo, la personaj nomoj prezentas per siaj nuancoj interesan studon.

Ankaŭ ili kompreneble sekvis tiun proksimigon kaj unuformigon, kiu karakterizas la eŭropajn lingvojn, kaj kiu montriĝas ĉefe en la sennombraj komunaj elementoj de la eŭropa vorttrezoro. Tial, multegaj nomoj troviĝas kun negrandaj diversecoj de Norvegujo ĝis Sicilio. Ĉie okazis stabiligo en la sama direkto, laŭ pli malpli samaj sociaj kaj juraj kondiĉoj, t. e. nun oni ĝenerale havas antaŭnomon kaj familian nomon. La antaŭnomo, elektita laŭplaĉe, ĝenerale de la gepatroj, en granda serio liverita de historia tradicio, solene deklarata ĉe religiaj kaj oficialaj ceremonioj, estas komune uzata nur en la familiaj aŭ familiaj rilatoj. La nomo montranta la apartenon al la familio estas heredata en jam fiksita formo, kaj indikas ofte, eĉ sen la antaŭnomo, la koncernen personon en la ĝenerala rilatoj; kiam ni parolas pri Marconi aŭ pri s-ino Lagerlöf, ni estas komprenataj, ankaŭ se ni ne aldonas la antaŭnomon. Kompreneble tiu sistemo prezentas iom malsamajn detalojn en la diversaj landoj. En Usono la ĝenerala tendenco estas havi trielementajn anstataŭ duelementajn nomojn, kaj regas multe pli granda libereco koncerne la elekton de la antaŭnomo; Britujo estas, kiel ofte, je mezvojo inter Eŭropo kaj Ameriko. Diversecoj estas ankaŭ rimarkeblaj en la sistemoj uzataj por edzinaj nomoj. Sed la modernaj sistemoj estas entute tre similaj, se ni komparas ilin, ekzemple, kun la antikva helena metodo, aŭ kun la teŭtonida, aŭ kun tiuj uzataj ĉe necivilizitaj popoloj.

Ĝi aspektas, kompare kun ili, tre seka kaj burokrata. Ni pensu al la ceremonio, kiu

nun okazas, kiam oni baptas ŝipon: bapto-patrino, kiu ĵetas kontraŭ la flankojn de la ŝipo ĉampanbotelon litigan per rubando je naciaj koloroj, bruo de kanonoj kaj de muziko, ktp. ktp.: grandioze, certe. Sed jen, antaŭ multaj jarcentoj, longhara Vikingo, kiu puŝas unufoje al la maro sian barkon, kaj konsiderante ĝin kvazaŭ personon, metas en ĝian virinan nomon ĉiujn esperojn venki la malamikan sorton. Ĉu, kompare, la nuna ceremonio ne ŝajnas al vi malpli varma kaj signifa? La ŝiponomo, kiu estis en la pratempoj personiganta forto, nun estas nur nomo por la navigadregistroj. Kies utilecon, cetero, neniu el ni eĉ pensus nei.

Same en la personaj nomoj. Ĉe la primitivaj popoloj la nomo ne estas nur kvazaŭ algluata karteto, sed la animo mem de la persono. Kion oni povas fari, kiam oni konas la nomon de homa aŭ eĉ dia persono, kaj oni kapablas laŭ ĝusta maniero ĝin deklami! homoj kaj dioj povas nur obei. Do, estas necese, ke la nomo estu la ĝusta; ĝi estas ofte la nomo de iu mortinta familiano, kiu reenkarigiĝas en la novnaskiton kaj kiu do devas repreni sian nomon: iu sonĝo rivelacias tiun faktan al la patrino mem aŭ iu divenisto ĝin malkovras per magiaĵoj. Sed la vera nomo ne estas konata de ĉiuj, ĝuste por eviti ke oni misuzu ĝin: komune ĝi estas anstataŭata per malpli kompromitanta nomo, indikanta ian kvaliton: „grandlipulon“, „belharulon“, aŭ simile. Tiaj moroj estas observitaj, en formoj pli malpli similaj, en la plej diversaj landoj: ĉe ŝamanistaj popoloj de Azio kaj en Centra Afriko, ĉe indianoj de Cilio kaj de Texas kaj en Aŭstralazio.

Ĉe la hindo-eŭropaj popoloj, tiaj kiaj ni ilin konas ĉe ilia apero en la historio, jam tiu ĉi stato estas forpasinta, kaj nur kelkaj apenaŭ rekoneblaj postrestaĵoj permesas su-

pozi, ke iam ili havis similajn kredojn kaj morojn. Magiaj agoj havas ĉiam kiel centron la nomon de persono: en la klasika epoko, por mortigi aŭ malsanigi personon, oni skribis ĝian nomon sur plumba lameno, kiun poste oni trapikis per najloj.

La antikvaj hindo-eŭropaj popoloj ne elektis, kiel ni faras, en pli malpli fiksita nomprovizo siajn nomojn, sed por ĉiu novnaskito kreis novan nomon, enhavantan laŭdon, bondeziron, dediĉon al iu diaĵo. Tiam praktikimon ni ankorau trovas, ekz., ĉe la grekoj kaj ĉe la teŭtonidoj, t. e. la pragermanaj popoloj. Ĉe la grekoj ni tre ofte trovas nomojn derivitajn de diaj nomoj: ekz. **Diokleo** „havanta gloron per Jupitero“, **Herodoto** „donita de Junono“, **Artemidoro** „donaco de Diano“, **Teodoro** „donaco de la dioj“ (pli poste, laŭ la kristana koncepto, „donaco de Dio“). Multaj aliaj aludas al famo, gloro, ktp.: **Perikleo** „tre glora“, **Temistokleo** „glora pro sia justeco“, ktp. La ofteco de tiuj ĉi aludoj montras la gravecon, kiun la antikvaj grekoj atribuis al la gloro: ĉiam la nomoj respegulas la kulturhistorian karakteron de la popoloj, kiuj ilin uzas. La libereco krei novan nomon por ĉiu novnaskito, kiu regis en la pratempoj, estas pli malfrue iom malpliigita: ekeŝtis ekzemple la kutimo nomi la unuan infanon laŭ la nomo de la patro de la patro.

Grandskale libera estis la nomkreado ankaŭ ĉe la teŭtonidoj. Kaj la idealoj, kiuj speguliĝas en la nomoj, estas ĉefe militaj: oni deziris al la geinfanoj esti soldatoj, bravuloj, herooj. Bruas en tiuj nomoj la glavoj, piedfrapas kaj blekas la ĉevaloj, furiozas la milito. Multforme la sinonimoj de „milito“ retroviĝas en la teŭtonidaj nomoj: **Hermano** estas la „homo de la armeo“, **Hildebrando** la „glavo de la milito“, **Gerhardo** „forta per sia ĵetlanc“, **Sigberto** „brila pro la venko“, **Sigsmundo** „la defendanto de la venko“, **Gustavo** la „bastono de la milito“, ktp. pomile kaj pomile. Same en la virinaj nomoj: la nomo de la reĝino **Klothildo**, la edzino de la reĝo **Klodoveo**, havas la saman signifon, kiel la nomo de ŝia edzo: „glora batalanto“ kaj „glora batalantino“. Aliaj, malpli oftaj, nomoj aludas al dia helpo aŭ protekto, aŭ al pacaj kvalitoj: ekz. **Frideriko** signifas „riĉa je paco“, kiel la antikva hebrea nomo de la reĝo **Salomono**, kiu same signifas „paculo“.

Sufiĉe malsama de la greka kaj de la teŭtonida sistemo, kaj kelkriate pli simila al la moderna, estis la latina nomdonado. La liberuloj havis almenaŭ du nomojn, plej ofte tri (ekz. **Marcus Antonius** aŭ **Tiberius Claudius Nero**): la unua similas nian antaŭnomon, la dua montras la gentan apartenon. La ebleco krei nomojn ekster la tradiciaj estis tre malgranda antaŭ la Imperia epoko; tiam fariĝas modo havi multajn nomojn, kaj oni jam ree povas ilin forĝi.

La plej grandaj ŝanĝoj okazas pro la influo de la Kristanismo, kaj paralele kun ĝia disvastiĝo. Dum la unuaj jarcentoj la varmeeco de la kredo trovas sian esprimon en novaj nomoj aludantaj al la novaj aspiroj kaj esperoj: **Gaudenco** (**Gaudentius**), **Vincenco** (**Vincentius**), **Ambrozo** (t. e. greke „nemortema“), ktp. Sed, ankaŭ kiam oni ne forĝas novan nomon, oni povas deklari sian fidon metante la novnaskiton sub la protekton de tiuj, kiuj montris je altega grado la kristanajn virtojn, t. e. donante al ĝi nomon de sanktulo aŭ de martiro. La nomdonado ligiĝas kun la ceremonio mem, kiu montras la spiritan renaskiĝon de la

homo kaj ĝian eniron en la eklezion, t. e. la baptoceremonio. Per tiu moro, pli malpli vigla laŭ la diversaj landoj kaj la diversaj epokoj, klariĝas la simileco de la eŭropa nomprovizo: la disvastiĝo de nomoj kiel **Johano** aŭ **Tomazo** estas konsekvenco de la sama kredo. Tiel klariĝas la ekzisto de sufiĉe multaj hebreaj nomoj: parte pro ilia uzado en la ĉirkaŭaĵo de Jesuo mem, kiel la cititaj (**Johano** signifas „dank' al Dio“, **Tomazo** signifas „dunaskito“), parte pro aludo al la Malnova Testamento, kiel ekz. **Mifaelo**, nomo de unu el la ĉefanĝeloj, signifanta „kiu estas kiel Dio?“, aŭ **Danielo**, nomo de unu el la profetoj, signifanta „Dio estas mia juĝanto“. La hebreaj nomoj enhavas tre ofte, kiel montras jam pluraj el niaj ekzemploj, la nomon de Dio.

Kvankam la komunaj elementoj estas sufiĉe multaj, la nomtrezoro de ĉiu popolo estas iom diversa de tiu de la aliaj, konforme al ties historio. Ekz. en la skandinavaĵaj landoj la nomoj de la kristana kulto komencas esti uzataj rilate malfrue, kaj nur iom post iom aldoniĝas al la pli antikvaj teŭtonidaj nomoj kaj sukcesas ilin superi laŭproportio. Sed en la lasta jarcento oni denove uzas grandskale la teŭtonidajn en la malnova skandinava formo. Kun **Peter**, **Nils** (Nikolao), **Lars** (Laŭrenco), **Karin** (Katarino) ktp. rivalas la antikvaj nomoj revivigitaj **Hjalmar**, **Einar**, **Regnar**, **Sigurd** ktp., por virinoj **Alfhild**, **Astrid**, **Gunnhild** ktp.

Kontraŭe, en la latinidaj landoj la plej antikva serio de romaj nomoj jam komencis esti anstataŭita de la kristanaj nomoj, kiam la teŭtonidaj invadoj konigis novajn nomojn, portitajn de la estranta klaso, kaj la modo rapide disvastiĝis: de la 8-a ĝis la 11-a jarcento la teŭtonidaj nomoj, ĉefe en Francujo, sed ankaŭ en Italujo kaj Hispanujo, havis la plej altan procentaĵon. Ĝis kiam la lingvoj de la invadintoj restis vivantaj, oni povis kun granda libereco kaj variece krei ĉiam novajn nomojn. Nur poste la kristana nomaro reprenis gravan rolon, kaj ĉe la fino de la Mezepoko la nomoj **Petro** kaj **Johano** kaj, por la virinoj, **Mario**, estis la plej vaste uzataj. Dum la Renesanco, disvastiĝas la modo de la klasikaj nomoj. Kelkiuj plendas: „Kiel agrable estis aŭdi, kiel oni ĉiam aŭdis antaŭ kelkaj jaroj, la belajn nomojn de la sanktuloj aplikitaj ĉe la bapto al la novaj kristanoj: **Petro** kaj **Paŭlo**, **Johano** kaj **Laŭrenco**; nun la afektemuloj volas nur havi romajn kaj grekajn nomojn: **Cezaro** kaj **Julo**, **Ahilo** kaj **Temistoklo**, kaj konsideras la kristanajn nomojn nur indaj de la malalta popolo...“ Samtempe, en la reformaciitaj landoj, oni sin ĵetas kun entuziasmo al la bibliaj nomoj, kaj oni evitas aliajn nomojn, ĉar tro katolikaj. Tiel ekz. en Germanujo oni bone rimarkas la diversecon de la sud-okcidenta kaj de la nord-orienta nomaro: **Huberto**, **Lamberto**, **Dominiko**, **Ignaco** estas tre komunaj en la katolikaj germanaj landoj, la samaj kie oni severe evitas la nomon de **Martino**, kiu estis la nomo de Lutero.

Jen kiel, ankaŭ perdinte la kutimon ĉiam libere krei novajn formojn, oni tamen povas per relative fiksa nomaro esprimi per la nomoj de la idoj siajn idealojn kaj aspirojn; jen kiel formiĝas, en la diversaj nacioj kaj regionoj, nomaroj, kiuj havas propran fizionomion. Krom la religiaj motivoj, kiujn ni ĵus citis, iam regas tradiciaj: ni jam vidis, ke ĉe la antikvaj grekoj oni ofte donis al la unua nepo la nomon de la avo; simila kutimo ekzistas ankoraŭ en kelkaj landoj.

Alifoje oni donas al infano la nomon de alia infano pli frue mortinta. Sufiĉe ofte oni trovas la kutimon doni al la filo nomon, kiu iamaniere memorigas pri la nomo de la patro: ekz. kiam ĉe la grekoj oni nomis **Demofilo** la infanon de **Filodemo** (t. e. „amiko de la popolo“) aŭ kiam la nepoj de **Hipokrato** ricevis la nomojn **Hipio** kaj **Hiparko**.

Ĉe la germanoj en la antikva **Hildebrandslied** ni trovas ke la patro, la filo kaj la nepo nomiĝas **Heribrand**, **Hildebrand**, **Hadubrand**; la tri nomoj komenciĝas per la sama litero kaj finiĝas per la sama elemento: la signifo de **Heribrand** estas „glavo de la armeo“, de la du aliaj nomoj „glavo de la batalo“. (Daŭrigota.)

La Esperanta Gramatiko.

(Antaŭe: Survoje al Konsilanta Gramatiko.)

Redaktanto: Teo Jung.

Oni demandas.

91. Diversaj kritikoj.

En Heroldo monata, marto kaj aprilo, mi trovis la jenon:

1. dek-unu. — Devus esti dek unu. Malzorgemo pri la unu- aŭ plur-vorteco de numeraloj estas ofta en Esp.-gazetoj.

2. neeblecon. — Atentinde estas, ke, laŭ kutima uzado, la vorto „nebla“ estas du-signifa: 1. malebla, ne farebla; 2. kiu povas esti neata (dubebla, „refutebla“, kontraŭstarebla).

3. „Strandoj“. — Neoficiala, en Plena Vortaro.

4. kriojn, jen laŭtajn . . . jen surdigojn. — Homo povas esti surda (ne povanta aŭdi facile); sono estas neaŭdebla, malforta, obtuza ktp.

5. ĵetis tiun krimon. — Stranga esprimo.

6. Ĝis la fino de marto aliĝis jam 700 kongresanoj. — Ĉe, je, antaŭ! Komparu: Mi aliĝis al UEA ĝis decembro = Mi pagis la kotizon ĝis tiu dato, kiam mi devos realiĝi. (Nenomito.)

92. Vorto.

Ĉu iu povas proponi vorton kiu oportune tradukas la vorton „file“ — tiom multe uzadatan en ĉiu anglalingva oficejo? Mi trovis nur „dokumentaro“, kiu ne kontentigas min. (R. F. V.)

93. Karesa sufikso.

Ĉu Injo aŭ Innjo? Inca estas slovena kaj Inetta itala karesnomo por Rozino. El tiuj jam naciaj karesnomoj mi simple faris belan Esperantan karesnomon „Innjo“, kiun mi ofte uzas anstataŭ Ronjo, Roznjo aŭ Rozinjo. Kvankam ĝi estas ĝusta, ŝajnas al mi ke tiu ĉi nomo tro aludas sufikson „in“, kiun samsignifon mi volas eviti metante „nj“ tuj post la unuan nomliteron „I“ anstataŭ (laŭ gramatikaj reguloj) post la dua. Se tiu ĉi formo estas permesita, kiun el ambaŭ oni rekomendu? (J. Sr.)

94. Stranga uzo de „poste“.

En la romano „Mi en li“ sur p. 21 mi trovis la jenajn frazojn:

„Ne temas pri ŝerco. Bonvolu afable rigardi. ke la junulino havas sangmakulitajn piedojn.“ — „Poste tio ne estas ŝia sango!“

Mi ne komprenas la signifon de „Poste“. (O. M.)

95. Ĉe.

S-ro Fauvart Bastoul en siaj „Stosilvortoj“ klarigas la vorton „ĉe“ jene: chez, à, tout contre — indique l'identité de lieu, un contact réel ou figuré et sans mouvement. Do, ĉu mi povas traduki la frazon „Demain, nous viendrons chez vous“ en Esperanton per „Morgaŭ ni venos ĉe vi? (aŭ: al vi, aŭ ĉe vin?)“

Oni respondas.

79. Ajn.

D-ro Zamenhof verŝajne kreis la vorton „ajn“, prenante ĝin de la germana esprimo „irgend ein“ (prononcu: irgend ajn), signifanta „kiu ajn, iu ajn“. (??)

„Verŝajne“ D-ro Z., se li vivus ankoraŭ, protestus kontraŭ la altrudo de tia elekto, kaj prave! Mi proponas alian klarigon: en la sveda lingvo — kiu nun interesas la samideanojn — vem = kiu, vad = kio, vem an = kiu ajn, vad an = kio ajn ktp.; „an“ nepre respondas al „ajn“ laŭ la senco kaj formo, ĉar la lingvoj, kiuj ne havas ĉ, ĝenerale anstataŭigas ĝin per aj, ekz. Caesar nomiĝas greke Kaisar.

Sed la majstro ne scipovis la svedan? Nu, serĉante radikon, li tamen povis uzi plurlingvan leksikonon aŭ demandi svedan konatulon, kiel li svedigis la latinan „quinque“. Ke li iufoje uzis tian helpon, tion pravas la vortoj „ju—des“, laŭlitere prenitaj el la sveda lingvo (ju—dess). (Ejuna.)

91. Diversaj kritikoj.

Legante tiom da kritikajoj je unu fojo, oni povus pensi, ke la monata eldono de Heroldo estas terure malkorekte redaktita. Sed ŝajnas, ke la nenomita kritikulo nenecese trosubtiligas.

1. Pri la unu- aŭ plurnombreco de numeraloj ni opinias, ke ne ekzistas nepra regulo. Ĉiu komprenas: dek unu, dek-unu aŭ (en unu vorto) deku; ni preferas la duan formon.

2. Dusingnecon de „nebla“ oni povas eviti, uzante por la dua signifo „neneigebla“.

3. „Strandoj“ estas neoficiala, sed tial ne malkorekta.

4. „Surdigita krio“ estas esprimo evitinda.

5. Povas esti strange „ĵeti krimon“; sed ĉu strangaj esprimoj ne ekzistas en ĉiu lingvo?

6. Koncerne la signifon de „ĝis“, ni ree diras: la nenomita kritikulo nenecese trosubtiligas. Kial malvastigi la senco de „ĝis“? La citita frazo sendube estas tute korekta. La kongresanoj aliĝis, nek „ĉe“, nek „je“, nek „antaŭ“ sed ĝuste „ĝis“ la fino de marto. Kial ne? „Je“ la fino de marto aliĝis eble 2, kaj „antaŭ“ la fino eble do 698! (Red.)

94. Stranga uzo de „poste“.

Ŝajnas ke la aŭtoro volas diri „verŝajne“, „supoze“, aŭ „sed“. (Red.)

95. Ĉe.

„Morgaŭ ni venos ĉe vi“ estas eraro. Kontraŭ „ĉe vin“ oni povas nenion havi, ĝi estas korekta, kvankam ni preferas „al vi“; aŭ: „Morgaŭ ni vizitos vin“. (Red.)